

NOKTO DE LINGVOJ KAJ KULTUROJ ATENDAS VIN!

VI FIERAS PRI VIA LANDO, LINGVO KAJ KULTURO, ŜATAS PREZENTI ĜIN AL SAMIDEANOJ ?

PARTOPRENU LA 42-an KONFERENCON DE ILEI KAJ
ĜUU NOKTON DE LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN KRAKOVO —
UNU EL TRADICIAJ ŜATATAJ ARANĜOJ EN LA URBO!

Lingva Festivalo jam iĝis unu el tradiciaj programeroj de ILEI konferencoj, tamen polaj samideanoj proponis tute alian koncepton — ĉijare okazos Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj en Krakovo. Ĝi la unuan fojon eniros serion de tre famaj, ŝatataj, popularaj aranĝoj, eble iĝos tradicia en tiu ĉi urbo, ŝatanta altkvalitajn kulturajn eventojn.

Ni tutkore invitas vin partopreni en la Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj prezentota de ILEI ĉi jare en Krakovo, Pollando.

NI PROMESAS — VIN ATENDAS PLURAJ SURPRIZOJ KAJ ĈARMAJ MOMENTOJ!

En la programo estas antaŭviditaj ne nur kutimaj lingvoprezentoj, sed ankaŭ **filmo** de R. Dobrzyński pri *la LF en Ĉeboksaro*, **prelego** *La pola kulturo en la tempo de L. Zamenhof*, **koncerto** de fama kaj ŝatata kantisto *JoMo*; al urbanoj kaj gastoj ni prezentos niajn lingvojn kaj kulturojn, pruvante, ke esperanto tre bone funkcias kiel lingvo-ponto kaj instruos esperanton iomete al ili. Ĉifoje la aranĝo estas turba, ĝin kunorganizas Śródmiejski Ośrodek Kultury (str. Mikołajska 2) en kies ejoj en malnova urbo ĝi okazos.

La Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj okazos la lastan vesperon — la 24an de julio kaj estos la lasta distra kaj kultura programero de la konferenco.

La Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj ĉifoje reĝisoras honora membro de pola ILEI sekcio — Maria Majerczak. Vi povas nun enskribiĝi por prezenti la

Por partopreni Lingvan Festivalon ne necesas aparte aliĝi — sufiĉas menciigi lingvon, kiun Vi prezentos en Via aliĝilo kaj pretigi gajan prezenton. Serĉu pliajn informojn pri la konferenco kaj Vi ekscios pri pliaj allogaj programeroj dum la tuta konferenco.



lingvon de via lando, sendante mesaĝon al Maria Majerczak ĉe nokto.de.lingvoj@gmail.com (kopie al prezidanto de LKK Małgosia Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com) aŭ indiki tiun deziron plenigante Vian aliĝilon. Vi bezonas nur doni vian nomon, kaj la nomon de la lingvo kiun vi volas prezenti.

Lastjare ni havis 15 lingvojn, kaj pli da instruantoj ĉar kelkaj kursetoj havis du, eĉ tri prezentantojn. Post kiam ni ricevos vian mesaĝon por prezenti vian lingvon, ni metos vian nomon kaj lingvon en la horaro de la Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj.

Niajn lingvojn dum mallongaj kursetoj kiuj daŭros nur 25 minutoj vi povos prezenti laŭ la maniero kiun vi preferas.

Ni faru, ke la Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj estu sukcesa kaj vaste reeĥu!

ILEI-KONFERENCO — AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, paroli pri historio, gramatiko, geografia regiono aŭ ligita kulturo, aŭ veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi nacian muzikon, instrui naciajn dancojn k. t. p. Sekvos 3-4 paralelaj duonhoraj prezentadoj. Dum niaj konferencoj ni uzas 25 minutojn por prezenti ĉiun lingvon. Ebla strukturo de la prezento povas esti ekzemple (ne nepre!):

1. Historio de la lingvo — 3 min.
2. Nuna geografia regiono de uzado de la lingvo — 2 min.
3. Prezento de ĉefaj gramatikaĵoj de la lingvo — 4 min.
4. Ekzemploj de tipaj esprimoj, salutvortoj ktp. — 5 min.
5. Nacia kulturo, ligita kun la lingvo — 6 min.
6. Ekzemploj de sonanta lingvo — 5 min.

Principe ne ekzistas ununura maniero por tia prezento, iu preferas esti pli serioza, iu prezentas en sia duonhoro kvazaŭ komedion.

NE PERDU EBLECON PREZENTI VIAN IDENTECON AL VASTA MONDO!

La 42-a Konferenco de ILEI en Krakovo (Pollando) 17-25 julio 2009

La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado

Kiel kutime, ankaŭ ĉi jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al Koleghelpa Fonduso (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al Fonduso Dazzini (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al konferenca kaso, k. t. p. Ankaŭ indas subteni la organizadon de nova seminario en Afriko, planata por julio 2009 en Kinŝaso.

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco_2009.php

Reta aliĝilo en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php> .Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Małgosia J. Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com — ĉefa loka organizanto, Radojica Petrović rade@ikso.net — prezidanto de ILEI, Sjoerd Bosga sjoerd@esperanto.se — kasisto de ILEI.

BONVENON!